
# TEMPO

Časopis Saveza za esperanto Hrvatske
Informilo de Kroatia Esperanto-Ligo

YU ISSN – 0352–1583



TIBOR SEKELJ

1912 - 1988

2
1988

## LA REDAKTORO DIRAS

Senvorte.


**TEMPO**

ZAGREB 1988. 11. 03.

broj/numero 37

godina/jaro IX

primjeraka/ekzempleroj 1800

osnivač i izdavač – fondinto kai eldoninto

**Savez za esperanto Hrvatske**
**Kroatia Esperanto-Ligo**

savjet lista – konsilantaro

[illegible]

glavni urednik, grafički i tehnički urednik

[illegible]

[illegible]

tisak – presejo – [illegible] – Internacia Kultura Servo

[illegible]

adresa redakcije – redakcia adreso

**Savez za esperanto Hrvatske**
**„Tempo"**

[illegible] 41000 Zagreb, [illegible] 6

[illegible] (041) [illegible]

[illegible]

cijena [illegible]

**350 din**

[illegible]

**1 200,- din**

[illegible]


Po mišljenju Republičkog sekretarijata za prosvjetu, kulturu [illegible] SRH, broj 2788/1-1980 od 16. 4. 1980. godine glasilo Saveza za esperanto Hrvatske „Tempo" oslobođeno je poreza na promet proizvoda.

La 20-an de septembro 1988
en Subotica mortis

# Tibor SEKELJ

Pluvivas liaj verkoj,
ideoj, homamo kaj
"lia mondo".



Humphrey TONKIN

# ONI NE POVAS ALIRI LA LINGVAN PROBLEMON EN IZOLO

Kompreneble ekzistas tiuj, kiuj konsideras la lingvan problemon minora inter la grandaj internaciaj problemoj. Ofte niaj specialistoj pri internaciaj aferoj eĉ ne aludas ĝin en siaj listoj de ĉefaj internaciaj demandoj. Multaj tiuj fakuloj eĉ ne konsideras la internacian komunikadon grava problemo, malgraŭ tio, ke la lukto inter la grandaj ideologioj de la mondo daŭras, la nacioj nur pene sukcesas kunvivi pace eĉ en plej bonaj okazoj, kaj la internacia kunlaboro restas improvizita, primitiva, kaj ofte neadekvata al la bezonoj. Tie kie ekzistas internaciaj organizaĵoj por akceli tiun kunlaboron, la organizaĵoj estas ofte malestimataj aŭ tiel interne disdividitaj, ke ili ne kapablas decidan agadon.

## GRAVAS EGALECO

La internacia komunikado ja ne estas celo en si mem, sed rimedo. Eble pro tio ĝi malofte menciiĝas en listoj, kiuj estas laŭ karaktero celaj. Tamen, kiel klare asertas la bjalistoka dokumento, "La demandoj de ekonomia evoluigo, de malarmado, de malsato, de malsano, de analfabeteco, de mediprotektado, k.s., postulas komunan kaj egalecan aliron pere de rekta komunikado en komuna lingvo." La aludo al egaleco estas grava: multaj mondaj problemoj ne estas solveblaj nur de la grandaj potencoj, sed postulas komunan, egalecan pritrakton. Esperanto metas ĉiujn homojn je la sama nivelo kaj do ebligas trakton de internaciaj problemoj en egala etoso - kontraste al la naciaj lingvoj, kiuj avantaĝas iujn kaj diskrimacias aliajn. Iasence, do, solvo de la lingva problemo, kaj de la problemo de internacia komunikado ĝenerale, estas antaŭkondiĉo por adekvata kaj daŭra solvo de aliaj problemoj mondaj.

La Deklaro de Bjalistoko, kvankam ĝi ne estas la unua doklumento, kiun la esperantistoj direktis al ŝtatestroj kaj aliaj aŭtoritatuloj, estas eksterordinare grava. Ĝi tuj sekvas alian elpaŝon faritan en en formo de deklaro, sed en formo de rezolucio - rezolucion de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, akceptitan fine de 1985, kiu rekonis "la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj", kaj kiu rekomendis ĝian pli vastan utiligon en la internaciaj rilatoj kaj en la lernejoj. La rezolucio de Unesko estas signifa en tio, ke ĝi originis ekster la Esperanto--movado, do en la formalaj politikaj rilatoj inter la ŝtatoj. La Bjalistoka Deklaro, tamen, pli klare ol iam ajn antaŭe, ligas la lingvan demandon senpere al aliaj grandaj problemoj inter la ŝtatoj kaj inter la unuopaj homoj.

## POZITIVA NEŬTRALECO

Tra la jaroj, la Esperanto-movado larĝe diskutis tiun rilaton inter Esperanto kaj la pli vasta mondo de aferoj. Tiu estis temo de deklaro farita en la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905, kiu notis, ke Esperanto estas unuavice lingvo utiligebla por ĉiu ajn celo, do ne fenomeno kun specifa idea programo. Kvankam ekestis, precipe en la 20aj kaj 30aj jaroj de nia jarcento, organizaĵoj, kiuj utiligis Esperanton por pli-malpli specifaj politikaj celoj, la centraj strukturoj de la Esperanto-movado restis politike neŭtralaj. Kompare kun multaj aliaj sociaj movadaj, la Esperanto-movado relative bone sukcesis malhelpi, en la postmilitaj jaroj, ke aliaj, flankaj problemoj aŭ malsameco de politikaj opinioj ĝin dividu. Universala Esperanto-Asocio mem zorge evitis prenon de politikaj starpunktoj. kiuj ne rilatis al Esperanto: ĝia statuto klare proklamas gian neŭtralecon. Samtempe, la moderna UEA, pli multe ol en antaŭaj periodoj, estas preta engaĝiĝi en la debaton ne nur pri lingvoj, sed ankaŭ pri

grandaj mondaj problemoj ĝenerale. Esperanto ja prezentas unike bonan rimedon, aŭ forumon, por fari tion.

Kvankam foje ni ŝatus imagi tion, politika neŭtraleco ne estas absoluta koncepto, sed ĝi praktikas principon de "pozitiva neŭtraleco": ĝi ne prenas strarpunkton pri demandoj ekster sia statuta kompetento, sed ĝi laŭpove ebligas liberan diskuton almenaŭ pri tiuj demandoj, kiujn eblas diskuti en libera forumo en difinita kunteksto. Tio ja estas nur praktika realigo de la ideo malantaŭ Esperanto - la ideo de internacia komunikado en egaleco. Eĉ pli esence, la Asocio konscias, ke oni ne povas aliri la lingvan problemon en izolo: ĝi estas rekte ligita al aliaj demandoj.

## LINGVO - POLITIKA FENOMENO


Efektive, lingvoj en si mem estas politikaj fenomenoj. La elekto de tiu aŭ alia lingvo en difinita politika aŭ socia sfero estas grava faktoro en la politikaj kaj sociaj rilatoj mem. Oficiala utiligo, ekzemple, de la angla lingvo, aŭ la franca lingvo, en ekskolonia lando, kiel lingvo de la registaro, povas ebligi partoprenon en la politika vivo nur al tiuj, kiuj konas tiun lingvon,. Utiligo de indiĝena lingvo, aliflanke, anstataŭ favori difinitan ekonomian tavolon (kiel emas uzado de ekskoloniaj lingvoj), povas favori unu aŭ alian etnan grupon. Kia ajn estu la solvo, minimume tiu solvo metas ĉiujn personojn, kiuj ne regas la officialan lingvon, en staton de dependeco je tiuj, kiuj ja ĝin regas. Multingvismo ankaŭ ne solvas la problemon: ĝi estas multekosta kaj malfacile administrebla, kaj ofte ŝajnigas solvi situacion efektive ne solvitan ĉar ekzistas hierarkio de lingvouzo.

## DISKRIMINACIO

Rifuzo aŭ neeblo utiligi difinitan lingvon en difinita kunteksto povas facile forŝlosi personojn el partopreno. Tiel la lingvo fariĝas ilo de diskriminacio aŭ de ekskluzivado, kaj lingvaj deferencoj naskas reciprokan malamon aŭ suspektemon. Aliflanke, troa insisto pri la supereco de la propra lingvo, kiel unu elemento en politika aŭ kultura aŭ ekonomia supereco, povas konduki al subpremo aŭ milito.

Ĉion ĉi la esperantistoj komprenas pli bone ol multaj aliaj, ĉar ili ja daŭre studas pri ĝia efiko je la monda politiko. Pro tio ili pledas por neŭtrala solvo al la lingva problemo - neŭtrala en la senco, ke ĝi favoras neniun unuopan homgrupon, kvankam ĝi estas facile lernebla por ĉiuj. Nu en situacio maksimume senigita je la misa utiligo de potenco, kaj en situacio kie ne staras periloj kaj interpretiloj inter la homoj (ĉu en formo de lingvaj servoj, ĉu en formo de registaroj aŭ aliaj instancoj, kiuj malebligas senperan kontakton) povas okazi tiu vera kompreniĝo, kiu kondukos al la paca solviĝo de la multiĝantaj problemoj de la homaro, kaj al la kunlaboro ĉirkaŭ la bonaj perspektivoj, kiuj sin prezentas al nia socio.





1887-1987 | Centjara Jubileo de Esperanto

# Ĉefaj prioritatoj por UEA

Universala Esperanto-Asocio preparis strategian planon por la dua jarcento. La dokumento estas ĝis nun pritraktata de la estraro kaj de la komitato de UEA. Tamen la traktadoj daŭros. Estus tre bone, se kiel eble plej vasta rondo de esperantistoj alparolus ĝin. Ĝuste tial ni publikigas la plej gravan parton titolitan Prioritatoj (la plena projekto estas 15-paĝa).

## 5. Prioritatoj

51. Surbaze de ĝiaj celoj kaj de la analizo de ĝia strategia situacio, ni povas starigi ĉefajn prioritatojn por UEA. Ili rilatas al tri ĉefaj terenoj de agado. Krom en la senco de punkto 55, ĉi-sube, ili ne estas lisigitaj laŭ prioritata ordo.

a) Disvastigo de Esperanto
b) Utiligo de Esperanto
c) Edukado al tutmonda konscio

## 52.) Disvastigo de Esperanto

Ĝi enhavas 5 elementojn:

1. Informado pri Esperanto al ĉiuj eksteraj instancoj
2. Instruado de Esperanto

## 53.) Utiligo de Esperanto

Ĝi enhavas 5 elementojn:

3. Praktika aplikado de Esperanto en ĉiuj sferoj de la homa vivo
4. Riĉigo de la kulturo kaj lingvo de Esperanto kaj konservado de la lingva unueco
5. Klerigo de niaj membroj pri Esperanto
6. Fortigo de la Esperanto-movado laŭnombre kaj laŭkvalite
7. Fortigo de UEA


## 54. Edukado al Tutmonda Konscio

Kvankam Esperanto estas utiligebla de ĉiuj personoj, UEA ekzistas interalie por fortigi la internacian vivon kaj faciligi la komunikadon en spirito de kunlaboro. Sekve, edukado al tutmonda konscio estas esenca parto de nia tsko - kaj en Esperanto-movado kaj ekster ĝi. Ĝi havas tri elementojn:

8. Informado pri la celoj kaj idealoj de internaciaj organizajoj, precipe UN Unesko
9.) Informado kaj studado pri mondaj demandoj, en kulturo, scienco, ekologio, homaj rajtoj kaj aliaj
10.) Kontribuo de nia scio pri lingvaj demandoj al la ekstera socio, kaj studado de la teoria kaj praktika bazo de Esperanto kiel solvo de la monda lingva problemo (kio siavice helpas plenumon de la unua prioritato: informado).

* * *

55. El tiuj ĉefaj prioritaoj kaj dek subdividoj, la unua - informado kaj instruado - estas la ĉefa. Ĉiuj agadoj de UEA devas esti juĝataj laŭ ilia kontribuo al plenumo de la supre listigitaj prioritatoj. Kvankam, je la landa, faka k.a. niveloj, estos iom da vario, ni invitas aliajn Esperanto-orgaizaĵojn mezuri la efikecon de sia agado laŭ tiuj tri prioritatoj: Disvastigo, Utiligo, Edukado al Tutmonda Konscio. Agadoj de UEA, kiuj ne rilatas al la prioritatoj, prefere estu haltigitaj favore al tiuj, kiuj kongruiĝas kun la prioritataj.



# ESPERANTO-FAKO EN LA BUDAPEŜTA UNIVERSITATO

Jam multaj scias, ke la 21-an de aŭgusto 1987 pro grava malsano mortis prof. d-ro Istvan Szerdahelyi, universitata docento, gvidanto de la Esperanto-fako en la Budapeŝta Universitato Eotvos Lóránd ekde ĝia fondo en 1966. Li famigis la fakon ankaŭ en internaciaj pedagogiaj kaj fakaj rondoj per la tiea scienca laboro, per universitataj lernolibroj kaj diplomigis preskaŭ 100 gestudentojn.

Post aŭgusto la sorto de la fako estis duba, sed per lastmomenta decido la instrua kaj scienca laboro pluiris eĉ kun du plentempaj postenoj, kiujn plenumas du eksstudentinoj, liaj kunlaborintinoj: Ilona Koutny kaj d-ino Zsuzsa Varga-Haszonits.

La fako estas unika en tio, ke ĝi donas samvaloran diplomon kiel aliaj fakoj de la universitato kaj ofertas kompletan esperantologian studtemaron por kvar jaroj. La studoj inkluzivas krom la lingvoinstruado, priskriban gramatikon, literaturon, movadhistorion, metodologion, interlingvistikon kaj temojn de la ĝenerala kaj aplikata lingvistiko. Tiel ĝi estas integra parto de la katedro Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, en kies kadro ĝi funkcias. Eblas ankaŭ doktoriĝi pri esperantologio.

Nuntempe krom la 13 tagaj studentoj ankaŭ 13 korespondaj studentoj partoprenas 3-jaran studprogramon. Tie la posedo de universitata diplomo kaj la scio de Esperanto estas antaŭkondiĉoj.

La memstara laboro de studentoj okazas en scienca studenta rondo – temas ĉefe pri pedagogio kaj lingvistiko, kaj ekde nun sub la gvido de Ilona Koutny ankaŭ pri komputilaj aplikoj (ekz. uzo de sintezita parolo en instruado, problemoj de maŝina tradukado). Aperadas studenta revuo Opus Nigrum, redaktata de István Ertl (ankaŭ redaktoro de IPR).

Eksterlandaj studentoj estas bonvenaj en la fako laŭ la kondiĉoj de la Universitato: 1. Studenoj, kiuj venas laŭ interŝtataj kontraktoj kaj ricevas stipendion, povas alpreni esperantologion kiel suplementan fakon; 2. Hungaroj, loĝantaj en la najbaraj landoj rajtas studi senpage, sed devas prizorgi sin mem; 3. ĉiuj aliaj eksterlandanoj devas pagi por la studado.

La studadon povas kompletigi la vigla esperantista vivo en Budapeŝto (kulturaj kaj sciencaj aranĝoj), eldonaĵoj kaj riĉa librokolekto.

Por pluaj informoj bv. turniĝi al Esperanto-fako, ELTE, Budapest, Pf. 107., H-1364, Hungario.

# ...IS ...AS ...OS

## IZBORNA SKUPŠTINA SEH-a

U subotu 08.10.1988. godine održana je u Zagrebu u Društvenom domu SSRN, Kaptol 27, izborna skupština SEH-a. U prilično opširnom dnevnom redu glavne točke bile izbor novog predsjedništva, delegata u RK SSOH i njezine komisije te izbor nove redakcije i savjeta lista "TEMPO". U novo predsjedništvo koje broji 15 članova izabrani su: Irma Kovačić, Neven Pufnik, Milan Kočiš, Ivo Osibov, Željko Klepić, Dalibor Kudumija, Sandra Tomaš, Gordana Malnar, Željko Vurm, Josip Brkanac, Marijana Jagnjić, Marijan Cecić, Željka Ivić, Željko Gubijan i Ivan Butorac. U omladinskoj organizaciji zastupati će nas Sanja Žigić, a urednik "TEMPA" je Ivica Špoljarec, koji je i dosada obavljao taj posao.
Pored izbora analizirao se i rad SEH-a u protekle dvije godine sa ciljem da se odrede smjernice za buduće djelovanje. Pozitivno je ocijenjeno informiranje, te širenje zagrebačke metode učenja esperanta. Uspješno organiziran 44. TEJO Kongres kao i međunarodni skup "100 godina esperanta" povećao je ugled SEH-a u međunarodnim razmjerima i doprinio povećanom interesu stranih esperantista za našu zemlju. Međutim, obim putovanja našeg članstva na domaće i međunarodne akcije opada što uz nedovoljnu brigu o višim stupnjevima obrazovanja i nedostatak opširnijeg hrvatsko-esperantskog rječnika dovodi do pada kvalitete jezika. Nedostatak suradnje između društava, kao i nepostojanje profesionalnog tajnika dovodi do pada akivnosti izvan Zagreba. Imajući to na umu donesen je okvirni plan rada i financijski plan za 1989. godinu. Iz njega slijedi da se nastavljaju već ustanovljene aktivnosti, dok novoga nema mnogo zbog ograničenih financijskih mogućnosti. Redovna godišnja skupština trebala bi se održati u 2. mjesecu iduće godine.
Prije početka radnog dijela skupštine, održana je prigodna svečanost povodom 80 godina organiziranog postojanja esperanta u Hrvatskoj. Bila je to prilika da se uz kratki historijski pregled koji je pripremio Radenko Milošević, pjesme u izvedbi Nevena Mrzlečkog i dijapozitiva koje je prikazao Ivica Špoljarec, stariji potsjete na "stare dane", a mladi nauče nešto više o počecima esperanta kod nas.

pripremio N. Pufnik

## NOVI PREDSJEDNIK I TAJNIK SEH-a

Na prvoj sjednici novoizabranog predsjedništva Saveza za esperanto Hrvatske, održanoj 29. 10. 1988. godine u Zagrebu, za novog predsjednika Saveza je izabrana Irma KOVAČIĆ a za tajnika Neven PUFNIK. Tajnik će svoje poslove i dužnosti obavljati u punom radnom vremenu.

## "HELIKO"

Antaŭnelonge aperis nova numero (la 16-a) de "Heliko" – gazeto de la Komunuma Esperanto-Organizaĵo de Rijeka. La grandformata, 110-paĝa kajero enhavas detalan historipriskriban eseon "Fenomeno de internacia lingvo en Rijeka" de Rade Ŝkalamera, kiu kune kun la represoj de multaj interesaj dokumentoj okupas la duonon de la numero. La artikolo "Međunarodni jezik – zašto?" prezentas la diskuton okazintan dum la samtema "Ronda tablo", kiun preparis esperantistoj el Rijeka pasintaŭtune (Partoprenis: S. Ŝtimec, T. Sekelj, J. Golĉiĉ, R. Ŝkalamera, S. Vitoloviĉ, M. Jakupoviĉ, V. Morankiĉ kaj pluraj aliaj membroj de E-societo el Rijeka). Krom tiuj du artikoloj interesaj kaj legindaj estas ankaŭ pluraj aliaj. La adreso de la redakcio estas: Esperanto-societo "A.Ŝ. Turkoviĉ", Korzo narodne revolucije 2a/III, 51000 Rijeka.

## ZAGREBA ESPERANTO-LIGO

En majo 1988 Zagreba Esperanto-Ligo organizis literaturan konkurson, per kiu oni intencis stimuli verkadon en Esperanto. La ĵurio (L. Borĉiĉ, E. Lapenna kaj I. Ŝpoljarec) decidis doni premiojn al jenaj konkursantoj en kategorio "Elementaj lernejoj" Ana Petroviĉ kaj Goran Svetliĉiĉ el V. Gorica, kaj gelernantoj el la zagreba lernejo "M. Krleĵa"; en kategorio "Mezlernejanoj kaj studentoj". Vanja Radovanoviĉ, Nataŝa Jakovljeviĉ kaj Gordana Naranĉiĉ el Zagreb; en karegorio "Ĉiuj ceteraj" Antun Simuniĉ el Osijek.

## SEMINAR ZA TAJNIKE U SINJU

U Sinju će se od 28.30. održati seminar za organizacione kadrove esperantskih društava SRH (tajnike i druge). Dolazak i smještaj su, 28.11. 29.11. seminarski rad, a 30.11. izlet u okolinu i poslije podne završetak seminara. Noćenja su besplatna, a cijena prehrane bit će utvrđena naknadno (troškove prehrane snose sami polaznici).

## KVIZ PIONIRA HRVATSKE U SINJU

U Sinju će se 29.11. održati i Kviz znanja esperanta iz 1-godišnjeg učenja (prema A-udžbeniku) za pionire (djecu iz osnovnih škola) iz SRH. Kviz će se odvijati tokom poslijepodneva 29.11. Dolazak pionira je prije podne 29.11. a odlazak nakon izleta 30.11. u poslijepodnevnim satima. Rok prijava (kako bi se mogao osigurati dovoljan broj noćenja i prehrane je 15.11.1988.) Propozicije, informacije i prijave: Društvo za esperanto "Dinko Šimunović" p.p. 70, 58230 Sinj.

## O. Š. "GUSTAV KRKLEC" U MAĐARSKOJ

Kao najaktivnija grupa na Osnovnim školama u Zagrebu, 10-oro djece te škole pod rukovodstvom nastavnice Ankice Benček boravilo je u ljetovalištu na Balatonu od 10-20.07.1988. zajedno sa mađarskom djecom iz mjesta Coldomolka.

## LJETNA ŠKOLA ESPERANTA U STRUGI

U Strugi je od 15-27. septembra ove godine Savez esperantista Makedonije po prvi puta organizirao ljetnu školu esperanta. Prisustvovalo joj je preko 100 sudionika iz Slovenije, Hrvatske, Makedonije, Bosne i Hercegovine i Vojvodine. Bili su organizirani tečajevi za početnike kao i napredni konverzacijski tečaj. Iz Zagreba su u Strugi boravili učenici O. Š. "Veljko Vlahović" iz Vrapča koji su prisustvovali početničkom tečaju i Judita Rey Hudeček, koja je vodila nastavu. Od 26 učenika iz Zagreba 15 ih je položilo ispit. Za sve polaznike škole bili su organizirani izleti u Ohrid i Sveti Naum. Slijedeće godine Ljetna škola esperanta u Strugi radit će u istom terminu od 15-27.08. a planiraju se pozvati i inozemne grupe. Smještaj, prehrana i nastava organizirani su u dječjem odmaralištu "25. maj" po izuzetno povoljnim cijenama. Za sve informacije u vezi ove škole možete se obratiti Juditi Rey, u Međunarodnom centru za usluge u kulturi, Zagreb, Amruševa 5, tel. 424-660.

## FOLKLORAŠI IZ VELIKE GORICE U POLJSKOJ

Mladi folkloraši KUD-a "Ivan Mladen" iz Velike Gorice boravili su od 25.04. do 1.05. u Poljskoj. Tom su prilikom imali i 5 folklornih nastupa za esperantiste i drugu publiku u Bydgoszczu, Gradnjsku, Torunu. U sklopu ove razmjene je 50 mladih poljaka boravilo u Zagrebu na IJK.




**Nova kasedo**

**Zagreba grupo "QUIZAS" kantas en ESPERANTO**

Okaze de la 44-a IJK estis eldonita kasedo de zagreba grupo "Quizas" kiu flegas latinamerikan muzikstilon.
Sur la A-flanko troviĝas kvin kantoj en Esperanto: Saluton kara Zagreb — Kiel estas tiu glaso — Guantanamera — Quizas — La Bamba.
B-flanke estas kvin plejparte hispanlingvaj kantoj.

La kasedo aĉeteblas ĉe KEL, Amruševa 5, YU-41000 Zagreb. Prezo: 10.000 din.



# DAN PRAVA ČOVJEKA

——— 10. PROSINCA ———

## 40. godišnjica Opće deklaracije o pravima čovjeka

Godine 1950, Generalna skupština UN je pozvala sve države i zainteresirane organizacije da počnu obilježavati 10. prosinca (datum kada je 1948. godine Skupština usvojila Opću deklaraciju o pravima čovjeka) kao Dan prava čovjeka (Rezolucija 423/V).

Opća deklaracija o pravima čovjeka unosi sjetlost u živote velikog broja ljudi — njene poruke neophodne su ljudima u svemu što čine.
Njene jednostavne riječi proklamiraju niz prava — građanskih, političkih, ekonomskih, socijalnih i kulturnih — koja pripadaju svim ljudskim bićima i neotuđiva su od njih.

---

Ljudi jedino mogu živjeti punim životima u svjetlu ljudskih prava — Ne dopustite da ta svjetlost potamni



## OPĆA DEKLARACIJA O PRAVIMA ČOVJEKA

Uvod

Budući da je priznavanje urođenog dostojanstva i jednakih neotuđivih prava svih članova ljudske porodice temelj slobode, pravde i mira u svijetu;

Budući da je nepoštivanje i preziranje prava čovjeka dovodilo do barbarskih postupaka, koji su vrijeđali savjest čovječanstva, i budući da je stvaranje svijeta u kojem će ljudska bića uživati slobodu govora i vjerovanja i biti slobodna od straha i nestašice proglašeno kao najviša težnja svakog čovjeka;

Budući da je bitno da prava čovjeka budu zaštićena pravnim sistemom kako čovjek ne bi bio prisiljen da kao krajnjem izlazu pribjegne pobuni protiv tiranije i ugnjetavanja;

Budući da je bitno poticati razvoj prijateljskih odnosa među narodima;

Budući da su zemlje članice Ujedinjenih naroda u povelji ponovo proglasile svoju vjeru u osnovna prava čovjeka, u dostojanstvo i vrijednost čovjekove ličnosti i ravnopravnost muškaraca i žena i budući da su odlučile poticati društveni napredak i poboljšavati životni standard u većoj slobodi;

Budući da su se zemlje članice obavezale surađivati s Ujedinjenim narodima na osiguravanju općeg poštivanja i primjene čovjekovih prava i osnovnih sloboda;

Budući da je opće shvaćanje ovih prava i sloboda od najveće važnosti za puno ostvarivanje ove obaveze,

GENERALNA SKUPŠTINA

proglašava

OVU OPĆU DEKLARACIJU O PRAVIMA ČOVJEKA kao opći ideal koji bi morali dostići svi narodi i sve nacije da bi svaki pojedinac i svaki organ društva, imajući ovu Deklaraciju stalno na umu, težio da učenjem i obrazovanjem pridonese poštivanju ovih prava i sloboda i da bi se postepenim nacionalnim i međunarodnim mjerama osiguralo njihovo opće i stvarno priznavanje primjena, kako među narodima samih zemalja članica, tako i među narodima onih teritorija koji su pod njihovom upravom.

ČLAN 1. Sva ljudska bića rađaju se slobodna i jednaka u dostojanstvu i pravima. Ona su obdarena razumom i sviješću i potrebno je da jedni prema drugima postupaju u duhu bratstva.

ČLAN 2. Svakom pripadaju sva prava i slobode proglašene u ovoj Deklaraciji bez ikakvih razlika u pogledu rase, boje kože, spola, jezika, religije, političkog ili bilo kojeg drugog mišljenja, nacionalnog ili društvenog porijekla, imovine, rođenja ili drugih okolnosti.
Nadalje, neće se praviti nikakva razlika na osnovi političkog, pravnog ili međunarodnog statusa zemlje ili teritorija kojem neka osoba pripada, bilo da je ona nezavisna, pod starateljstvom, nesamoupravna, ili da se nalazi pod bilo kojim drugim ograničenjem suverenosti.

ČLAN 3. Svatko ima pravo na život, slobodu i osobnu sigurnost.

ČLAN 4. Nitko ne smije biti držan u ropstvu ili potčinjenosti: ropstvo i trgovina robljem zabranjeni su u svim oblicima.

ČLAN 5. Nitko ne smije biti podvrgnut mučenju ili svirepom, nečovječnom ili ponižavajućem postupku ili kazni. ČLAN 6. Svatko ima pravo da svugdje bude priznat kao pravni subjekt.

ČLAN 7. Svi su pred zakonom jednaki i imaju prava bez ikakve razlike, da ih zakon jednako štiti. Svi imaju pravo na jednaku zaštitu protiv bilo kakve diskriminacije kojom se krši ova deklaracija i protiv svakog poticanja na ovakvu diskriminaciju.

ČLAN 8. Svatko ima pravo da ga nadležni nacionalni sudovi efikasno štite od djela kršenja osnovnih prava koja su mu priznata ustavom ili zakonima.

ČLAN 9. Nitko ne smije biti proizvoljno uhapšen, pritvoren, niti protjeran.
ČLAN 10. Svatko ima potpuno jednako pravo na pravedno i javno suđenje pred nezavisnim i nepristranim sudom koji će odlučiti o njegovim pravima i obavezama, i o osnovanosti svake krivične optužbe protiv njega.

ČLAN 11. (1) Svatko tko je optužen za krivično djelo ima pravo da bude smatran nevinim dok se na osnovi zakona krivica ne dokaže na javnoj raspravi na kojoj su mu osigurane sve garancije potrebne za njegovu obranu.
(2) Nitko ne smije biti osuđen za djela ili propuste koji nisu predstavljali krivično djelo po nacionalnom ili međunarodnom pravu u vrijeme kad su izvršeni. Isto tako ne smije se izricati teža kazna od one koja se mogla primijeniti u vrijeme kada je krivično djelo izvršeno.

ČLAN 12. Nitko ne smije biti izložen samovoljnom miješanju u privatni život, porodicu, stan ili prepisku, niti napadima na čast i ugled. Svatko ima pravo na zaštitu zakona protiv ovakvog miješanja ili napada.

ČLAN 13. (1) Svatko ima pravo na slobodu kretanja i izbora mjesta stanovanja u granicama pojedine države. (2) Svatko ima pravo da napusti bilo koju zemlju, uključujući i svoju vlastitu,i da se vrati u svoju zemlju.

ČLAN 14. (1) Svatko ima pravo da traži i uživa u drugim zemljama utočište od proganjanja.
(2) Na ovo se pravo nitko ne može pozivati u slučaju proganjanja koja se zasnivaju na običnom krivičnom djelu ili postupku protivnom ciljevima i načelima Ujedinjenih naroda.

ČLAN 15. (1) Svatko ima pravo na jedno državljanstvo.
(2) Nikome ne smije biti samovoljno oduzeto državljanstvo niti pravo da ga promijeni.

ČLAN 16. (1) Punoljetni muškarci i žene, bez ikakvih ograničenja u pogledu rase, državljanstva i vjere, imaju pravo da sklope brak i da osnuju porodicu. Oni su ravnopravni prilikom sklapanja braka, za vrijeme njegovog trajanja i prilikom njegova razvoda.
(2) Brak se može sklopiti samo uz slobodan i potpun pristanak osoba koje stupaju u brak.
(3) Porodica je prirodna i osnovna ćelija društva i ima pravo na zaštitu društva i države.

ČLAN 17. (1) Svatko ima pravo da posjeduje imovinu, sam kao i u zajednici s drugima.
(2) Nikome ne smije samovoljno biti oduzeta imovina.

ČLAN 18. Svatko ima pravo na slobodu misli, savjesti i vjere: ovo pravo uključuje slobodu promjene vjere ili uvjerenja i slobodu da čovjek, bilo sam ili u zajednici s drugima, javno ili privatno, manifestira svoju vjeru ili uvjerenje putem nastave i obavljanja obreda.

ČLAN 19. Svatko ima pravo na slobodu

mišljenja i izražavanja, što obuhvaća i pravo da ne bude uznemiravan zbog svog mišljenja, kao i pravo da traži, prima i širi obavještenja i ideje bilo kojim sredstvima i bez obzira na granice.

ČLAN 20. (1) Svatko ima pravo na slobodu mirnog zbora i udruživanja.
(2) Nitko ne može biti prisiljen da pripada nekom udruženju.

ČLAN 21. (1) Svatko ima pravo da sudjeluje u upravljanju javnim poslovima svoje zemlje, neposredno ili preko slobodno izabranih predstavnika.
(2) Svatko ima pravo da na ravnopravnoj osnovi stupa u javnu službu u svojoj zemlji.
(3) Volja naroda je osnova državne vlasti: ova volja mora se izražavati na povremenim i slobodnim izborima, koji će se provoditi općim i jednakim pravom glasa, tajnim glasanjem ili odgovarajućim postupkom kojim se osigurava sloboda glasanja.

ČLAN 22. Svatko, kao član društva, ima pravo na socijalno osiguranje i pravo da ostvaruje privredna, društvena i kulturna prava neophodna za svoje dostojanstvo i za slobodan razvoj svoje ličnosti, uz pomoć države i međunarodne suradnje, a u skladu s organizacijom i sredstvima svake države.

ČLAN 23. (1) Svatko ima pravo na rad, na slobodan izbor zaposlenja, na pravedne i zadovoljavajuće uvjete rada i na zaštitu od nezaposlenosti.
(2) Svatko, bez ikakve razlike, ima pravo na jednaku plaću za jednaki rad.
(3) Svatko tko radi ima pravo na pravednu i zadovoljavajuću naknadu koja njemu i njegovoj obitelji osigurava egzistenciju koja odgovara ljudskom dostojanstvu i koja će, ako bude potrebno, biti upotpunjena drugim sredstvima socijalne zaštite.
(4) Svatko ima pravo da osniva i da stupi u sindikate radi zaštite svojih interesa.

ČLAN 24. Svatko ima pravo na odmor i razonodu, uključujući razumno ograničenje radnog vremena i povremeni plaćeni odmor.

ČLAN 25. (1) Svatko ima pravo na životni standard koji osigurava zdravlje i blagostanje, njegovo i njegove obitelji, uključujući hranu, odjeću , stan i liječničku njegu i potrebne socijalne službe, kao i pravo na osiguranje u slučaju nezaposlenosti, bolesti, onesposobljenosti, udovištva, starosti ili drugih slučajeva gubljenja sredstava za izdržavanje uslijed okolnosti nezavisnih od njegove volje.
(2) Majke i djeca imaju pravo na posebnu brigu i pomoć. Sva djeca, rođena u braku ili izvan njega, uživaju jednaku socijalnu zaštitu.

ČLAN 26. (1) Svatko ima pravo na školovanje. Školovanje treba da bude besplatno bar u osnovnim i nižim školama. Osnovna nastava je obavezna. Tehnička i stručna nastava treba da bude opća, a viša nastava treba da bude svima podjednako pristupačna na osnovi sposobnosti.
(2) Školovanje treba da bude usmjereno punom razvitku ljudske ličnosti i učvršćenju poštovanja čovjekovih prava i osnovnih sloboda. Ono treba da unapređuje razumijevanje, trpeljivost i prijateljstvo među svim narodima, rasnim i vjerskim grupacijama, kao i djelatnost Ujedinjenih nacija za održavanje mira.
(3) Roditelji imaju prvenstveno pravo da biraju vrstu školovanja za svoju djecu.

ČLAN 27. (1) Svatko ima pravo da slobodno sudjeluje u kulturnom životu svoje zajednice, da uživa u umjetnosti i da sudjeluje u naučnom napretku i u dobrobiti koja otuda proistiće.
(2) Svatko ima pravo na zaštitu moralnih i materijalnih interesa koji proističu iz bilo kojeg znanstvenog, književnog ili umjetničkog djela čiji je on tvorac.

ČLAN 28. Svatko ima pravo na društveni i međunarodni poredak u kojem prava i slobode objavljeni u ovoj Deklaraciji mogu biti potpuno ostvareni.

ČLAN 29. (1) Svatko ima dužnost prema zajednici koja jedino omogućava slobodno i puno razvijanje njegove ličnosti.
(2) U vršenju svojih prava i sloboda svatko može biti podvrgnut samo onim ograničenjima koja su predviđena zakonom u cilju osiguranja nužnog priznanja i poštovanja prava i sloboda drugih i u cilju zadovoljavanja pravednih zahtjeva morala javnog poretka i općeg blagostanja u demokratskom društvu.
(3) Ova prava i slobode ni u kom slučaju ne mogu se izvršavati protivno ciljevima i načelima Ujedinjenih naroda.

ČLAN 30. Nijedna odredba ove Deklaracije ne može se tumačiti kao pravo za bilo koju državu, grupu ili osobu da obavlja bilo koju djelatnost ili da vrši bilo kakvu radnju usmjerenu na poništenje prava i sloboda koji su u njoj sadržani.



# utile kaj interese

Prof. dr DALIBOR BROZOVIĆ
ČLAN POČASNOG ODBORA UEA

Na ovogodišnjem Svetskom kongresu esperantista u Rotterdamu prof. dr Dalibor BROZOVIĆ (iz Zadra) je izabran za člana Počasnog pokroviteljskog odbora (Honora Patrona Komitato) Svjetsskog saveza esperantista. Ovaj se odbor sastoji od lingvista, znanstvenika i ostalih eminentnih osoba koje se služe esperantom, a ujedno svojim radom i zalaganjem doprinose njegovom unapređenju.
Odbor momentalno ima 13 članova među kojima su i predsjednik udruženja pisaca Kine,Bakin; predsjednik švedskog parlamenta, Ingemund Bengtsson; poznati svjetski pisac znanstvene fantastike, Harry Harrison i drugi.



NIKOLA RAŜIĈ
NOVA KKS

Nova Konstanta Kongresa Sekretario (KKS) de UEA, ekde septembro 1988, estas Nikola Raŝiĉ, sociologo kaj lingvisto el Zagreb. Pro la plenumo de tiu tasko li transloĝiĝis al Rotterdamo kaj ekposteniĝis en Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio.

KOPSO – ESPERANTO–KOOPERATIVO EN MOSKVO

La 18-an de majo 1988 en Moskvo naskiĝis KOPSO, esperantista unstrua kooperativo. Ĝia anonco aperis la 15-an de junio en la gazeto "Soveta Rusio" (eldonata en 5 milionoj da ekzempleroj). Komence de aŭgusto jam pli ol 200 personoj serioze studas Esperanton per la koresponda kurso de la kooperativo. Ili loĝas dise tra USSR – de Aŝhabado ĝis Tiksi kaj de Lvovo ĝis Sahalino. Ni atendas, ke jam fine de la jaro la unua kvanto de la kursanoj finos la inician parton de la programo.
Ili estas interesaj homoj, kaj ili bezonas bonajn korespondamikojn el la tuta mondo. Multaj el ili deziras interŝanĝi reciprokajn, proponojn kaj ideojn. Klubo, asocio aŭ individuo skribonta al KOPSO, nepre ricevos respondon kaj – preskaŭ nepre – konvenan korespondanton.
Turnu vin al KOPSO, Interservo, KD "Lenino" 53-1 Birjulevskaja str, SU--115372 Moskvo.

PROFESIA LABORO
EN HAMBURGO

Ekde la 1-a de marto kvar dungitoj laboras en Hamburgo por la plibonigo de internaciaj kontaktoj helpe de Esperanto.
Ilin dungis la Oficejo pri Eŭropa interkompreniĝo de la Societo pri internacia Lingvo en la ladro de la tiel nomita ABM, ŝtata programo por senlaboruloj. La oficejo okupas unu etaĝon de la sidejo de Hamburga Esperanto-Societo kaj ebligas profesian laboron por la internacia lingvo.





## UNESCO

24. Generalna konferencija UNESC-a, održana 11.10.1987., izglasala je i 4 rezolucije o jezicima. Rezolucijama se želi unaprijediti upotreba i položaj kineskog, španjolskog, ruskog i portugalskog jezika u ovoj međunrodnoj organizaciji. Kineskim jezikom se služi više od petine svjetskog stanovništva a španjolski kao materinji govori oko 300 miliona ljudi u više od dvadeset zemalja — istaknuto je u ovim rezolucijama.

(el "UN kaj ni", 47)

## ARAPSKI

Arapski je službeni jezik dvadeset zemalja i govori ga 4% svjetskog stanovništva, međutim na tom se jeziku izdaje svega oko 1% svjetske produkcije knjiga. 6,4% arapa posjeduje televizor ali 32% programa koje prate su proizvedeni u SAD a 13% u Francuskoj. Ovi su podaci objavlejni na Međunarodnog konferenciji o politici komuniciranja među arapskim zemljama, održane u Khartumu 19—23.07.1987. Konferencija je podržala zahtjeve za uvođenje i osmišljavanje "Novog svjetskog poretka u informiranju i komuniciranju".

(el "UN kaj ni", 47)

## ALBANIO

Laŭ la informoj de Marcel Cortiade, kiu estis en Tirana, ĉi jare oni komencis kompili albana-Esperanto vortareton, kiun li estis petita kontroli. Samtempe li informas ke printempe estis farita prelego pri esperanto en Tirana Universitato.

## J. PEREZ de CUELLAR

Ĝenerala sekretario de Unuiĝinta Naciaro, J. Perez de Cuellar, en la intervjuo donita al revuo de la itala flugkompanio Alitalia, menciis ke UN havas 266 buŝtradukistojn kaj 437 papertradukistojn por 6 oficialaj lingvoj (angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa) nekalkulante tiujn kiuj laboras neregule laŭ kontrakto. Krome li montris iteresajn ciferojn de la nombroj de la denaskaj parolantoj de grandaj lingvoj (ciferoj en milionoj):

| | |
|---|---|
| ĉina | 788 |
| angla | 420 |
| hindia | 300 |
| hispana | 296 |
| rusa | 285 |
| araba | 177 |
| bengala | 171 |
| portugala | 164 |
| malaj-indonezia | 128 |
| japana | 122 |
| germana | 118 |
| franca | 114 |

## AFRIČKI ESPERANTO

Nigerijski pronalazač bez mature Alex Igbineweka vjeruje da je pronašao rješenje za sporazumijevanje u ovoj brojnoj višeplemenskoj državi u kojoj se govori više od 400 dijalekata. Umjesto službenog engleskog Igbineweka predlaže gousa jezik, sklapan od nigerijskih i afričkih jezika i dijalekata. Nedavno je u Nacionalnom kazalištu u Londonu promovirao rječnik od 30.000 riječi i gramatiku. Lingvistički se stručnjaci zgražaju nad konstrukcijom tog jezika, ali se autor ne da zbuniti. Upravo na scenu postavlja komediju na novom jeziku i izdaje knjigu pjesama. Tvrdi da ga je na izum potakao Sveti Duh.

("Večernji list", 18.05.'88.)




## KORESPONDA SERVO MONDSKALA

La KORESPONDA SERVO MONDSKALA kreita de UEA antaŭ 32 jaroj nun moderniĝis kaj funkcias per komputilo. Ĉiujare milo da personoj utiligas ĝin.
Kion fari por uzi tiun servon? Sendu al KORESPONDA SERVO MONDSKALA "Les Hortensias 2" 121 bis Bvd Napoleon III, F-06200, NICE, Francio viajn personan kaj familian nomojn, aĝon, sekson, civilan staton, kompletan adreson (preslitere, klare), indiku kiom da korespondantoj vi deziras, el kiuj landoj, pri kiuj temoj vi volas korespondi.
Aldonu du internaciajn respondkuponojn aŭ 1 US-dolaron en monbileto aŭ per poŝtkonto je la nomo de la komisito: R. Llorens, Marseille 7.829.40.L.
Se neeblas al vi sendi monon aŭ IRK, vi ne ricevos rektan respondon, ĉar K.S.M. ricevas nenian subvencion, sed via slipo estos enŝovita en la komputilon kaj pli malfrue vi ricevos leterojn de iuj korespondemuloj.
Havi plumamikojn en la mondo estas la plezuro de ĉiu esperantisto, sed ne estu tro postulema! Ne petu korespondanton en iu insuleto de la Pacifika Oceano! Tie malfacile sin trovas via korespondanto. Ne petu nur francan korespondanton, sed plurajn landojn, plurajn temojn.

## SKITAGOJ EN ĈSSR
## 1989 1.22–27.

Ĉeĥa Esperanta-Junularo invitas geesperantistojn al sia tradicia sporta aranĝo kiu okazos en montaro Krkonoŝe, 22–27.01.1989. La prezo estas 180 kronojn (ĝi ne inkluzivas manĝojn, sed eblas mem kuiri en komuna kuirejo). Programo: skiado, ludoj, vespera komuna amuzo, dancado, ekskurso ktp. Limdato por aliĝo estas la 20-a de decembro 1988. Kontaktadreso: Irena Jiraskova, B. Nemcove 372, 54201 Žacler, Ĉeĥoslovakio.

## 73. SVJETSKI KONGRES ESPERANTISTA U ROTTERDAMU

Ovogodišnji svjetski kongres esperantista održan je u srpnju ove godine u Rotterdamu, gradu u kojem je sjedište Svjetskog esperantskog saveza (UEA). Kongres je kao i svi dosadašnji imao karakter masovne kulturne manifestacije i druženja na kojoj se okupilo više od 2300 sudionika iz 63 države. Glavna tema je bila " Znanost i tehnika u službi međunarodnog sporazumijevanja", a obilježena je i 80-godišnjica osnivanja i rada UEA.




## ESPERANTA BILDVORTARO (DUDEN)


Post 24 jaroj da prilaborado aperis esperanta traduko de fama bildvortaro "Duden". Terminoj por 25000 objektoj el la ĉiutaga vivo estas troveblaj pere de 360 unukoloraj kaj 6 koloraj bildkompleksoj laŭteme ordigitaj. La terminoj estas serĉeblaj ankaŭ per detalega 194-paĝa indekso. Je la esperanta traduko kunlaboris 143 fakuloj el 25 ŝtatoj. La ĉefredaktoro estas Rudiger Eichholz, Direktoro de la Terminologia centro de Internacia Scienca Asocio Esperantista. La prezo de la 880-paĝo, bone bindita verko, estas 48 US-dolaroj (aŭ ekvivalento en aliaj valutoj) plus sendokostoj. Eldonisto: Esperanto press, Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1B0.


El la "Esperanta bildvortaro"


### ŜAKO


1-16 ŝak-ludo (ŝako, reĝa ludo) [ludo de kombinoj aŭ pozicioj]
1 ŝak-tabulo kun la figuroj en komenca pozicio
2 blanka kvadrato (blanka ĉelo)
3 nigra kvadrato (nigra ĉelo)
4 blankaj ŝak-figuroj
5 nigraj ŝak-figuroj
6 literoj kaj ciferoj por indiki la ŝak-kvadraton kaj por noti ŝak-partiojn kaj ŝak-problemojn
7 ŝak-figuraj simboloj por indiki ŝak-figurajn poziciojn
8 reĝo
9 damo
10 kuriero
11 ĉevalo
12 turo
13 peono
14 mov-eblecoj de la diversaj figuroj
15 mato > mato per ĉevalo
16 ŝak-horloĝo [duobla horloĝo por ŝak-turniroj]



Dudek teatroj el dekunu landoj de Eŭropo partoprenis ĉi-jaran, la 21-an Pupteatran Internacian Festivalon en Zagreb. Ses teatroj prezentis siajn prezentaĵojn en Esperanto. Laŭ la decido de la Internacia Lingva Ĵurio la unuan premion por la plej bona sceneja Esperanto ricevis Ŝtata Teatro de Pupo kaj Aktoro „Baj Pomorski" el Toruń, Pollando. La sama ĵurio atribuis premion „Tibor Sekelj" (por la prezentaĵo kun la plej homama mesaĝo) al spektaklo „Lotta ...", plenumita de Pupteatro „Maximus" el Vaxjo, Svedio. La Internacia Infana Ĵurio sian premion donis al la Zagreba Pupteatro. La ĉefan festivalan premion „Milan Čečuk", laŭ la decido de la Internacia Faka Ĵurio, ricevis Tartana Teatro el Madrid, por la prezentaĵo „Lear ...".

LA 22-a PIF – 1989. 08. 25-31. – ZAGREB

## MONDA ESPERANTO CENTRO

La urbo Bialistoko (Pollando) donacis kvinhektaran terenon (egalas proksimume al 10 akreoj) – kie en la pasinteco situis la Bialistoka bazaro – por konstrui tie la Mondan Esperanto-Centron "Zamenhof".

Dum la UK en Rotterdamo oni prezentis la skizon de la projekto (la konkurso estis fermita en junio). La reprezentantoj de la urbo Bialistoko forte substrekis neceson ellabori komunan planon de la financado. La prezidanto de UEA, prof. H. Tonkih, akcentis, ke la Esperanto-movado ne kapablus mem financi la tutan entreprenon, sed nepre devus partopreni en la financado. La ĉefa financado devus veni de la Polaj kaj la ekster-E-movadaj fontoj.

Vere necesas, ke ĉiu E-klubo aŭ societo dediĉu atenton al la projekto, ke oni aŭskultu al opinioj, proponoj kaj ideoj de la membaro, kaj ke tio, kion oni akceptos kiel pozitiva helpo (ĉu mona aŭ idea), estu raportota al UEA.

(laŭ "Heroldo")

# ENIGMATIKO

## REKOLEKTU

## "LA ESPERO"-n


En la apudaj du ŝak-tabuloj troviĝas vortoj de la himno "La Espero". Sekvante ĉevalsaltan iron, komencante de la kvadrateto "1", oni povas rekolekti la vortojn al ilia ĝusta kaj origina sinsekvo.

Aŭtoro: Života Butrić

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| sankta | Ne | Sub | tanta | venis | 1 La | Kolek | solfanta |
| promesas | [illegible] | signo | [illegible] | l' esperu | sangon | nova | la |
| voko | [illegible] | Ĝ | harmonion | ESPERO | mondon | Ĝi | tiĝas |
| eterne | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | rapide | en | sentu, |
| Nun | al | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | paca, | kreskas |
| Per | mond | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | Tra | homan |
| Ĝi | de | [illegible] | forta | daŭri | mondo | Per | bata |
| la | voko | flugu | facila | afero | lantoj, | tiras | la |

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Per | rantoj, | efekti | kolegaro | eterna | staras | paca | la |
| viĝos | diligenta | la | Forte | laboro | unu | de | l'homaro |
| espe | baroj, | En | ben | muroj | Por | alian, | ne |
| Nia | Lazaro | la | sankta | nente | faciĝos, | de | miljaroj |
| obstinaj | amo | familian | Ludoviko | sonĝo | Inter | Kompre | La |
| rondon | de | Sur | dissaltos | lingva | en | Ŝis | la |
| disbatitaj | la | Zamenhof | konsento | dividitaj, | bela | popoloj | mento, |
| laboro | Unu grandan | Sed | neŭtrala | faros | funde | popoloj | la |

# Korespond-proponoj



## Pollando

- Stanislaw PIŁAT, 24-311 Rogów 116, w. Lublin, Pollando * 23- jara oficisto interesiĝas pri sporto, historio kaj geografio.
- Zbigniew CHUDZIK, 76-200 Slupsk, M. Nowotki 12/19 * 26-jara oficisto interesiĝas pri sporto, fotografado, turismo kaj muziko.
- Mariusz LESNIKOWSKI, Ul. Zadworna 11, 42-122 Ostrowy * 19-jara interesiĝas pri muziko kaj fotado.
- Antonina ZAVISA, Lecno 85, 97-333 Lecno * 40-jara instruistino.
- Dariusz SMIECINSKI, 21-300 Radyn Pooll., Ul. Traugutta 7 * 26-jara laboristo, ŝatas filmon, teatron, sporton kaj naturon.
- Joanna WINIARCZYK, ul. Kochanowskiego 3m. 31, 23-200 Kraśnik * dez. koresp. kun jugoslavoj pri moderna muziko, filmo kaj turismo.
- Elżbieta KEMBLOWSKA, ul. Aleksandrowska 16 m 56, 91-120 Łódź * 30-jara oficistino interesiĝas pri literaturo, muziko kaj turismo; kolektas librojn kaj sondiskojn.
- Krystyna RUDZINSKA, Smolenta 20, 09-550 Szczawin * 32-jara ekonomistino interesiĝas pri turismo, fremdaj lingvoj, filmoj kaj libroj.
- Grzegorz KRAWCZYK, Ul. J. Slowackiego 9/26, 26-300 Opocyno * 15-jara lernanto deziras korespodi kaj interŝanĝi metalan monon.
- Ryszard KWIATKOWSKI, 14-528 Lipowina 9/12, woj. Elblag * 32-jara laboristo interesiĝas pri turismo, sporto kaj folkloro.
- Krystyna WŁODARCZYK, Ul. Skarżyńskiego 2/404/II, 31-627 Kraków * 33-jara ekonomistino ŝatas filmon, teatron, sporton kaj naturon.
- Zdzislaw DZIEWIECKI, Ul. Grunnaldzka 8/10, 25-727 Kielce * 22-jara. Hobioj: historio, muziko, literaturo, filmo, turismo ktp. Kolektas: sondiskojn, bildkartojn, revuojn ktp.
- Dorota DOLECKA, Ul. Retan 6/5, 37-700 Premyd * 20-jara knabino dez. koresp. kun geknaboj el Jugoslavio pri diversaj aferoj.
- Slawomir BRZYSKI, str. Koźmiana 10/9, 22-400 Zamość * 21-jara studento interesiĝas pri sporto, turismo kaj fiziko.
- Malgorzata ARCIZEWSKA, Szkola Podstawowa, PL 21-014 Nadrybie * 23-jara instruistino interesiĝas pri turismo kaj folkloro.
- Tadeusz DUDZIAK, Lewice 30B, 48-144 Włodienin * 26-jara laboristo interesiĝas pri turismo kaj literaturo.
- Florian WALEZAK, Ul. Piotrkowska 84, 97-425 Zelow * 38-jara fraŭlo deziras korespondi kun jugoslavino.
- Kazimierz CZUCZMAN, Ul. Sosnowa 1, 44 330 Jastrzebie Zdroj * 39-jara kuracisto interesiĝas pri turismo.
- Dorota GUZOKIEWICY, UPT, 27-205 Karachowice 7 * interesiĝas pri filatelio kaj turismo.
- Radosław SIENICKI, Sienica Lipusy. 15, 18-220 p-ta Czyżew * 18-jara knabo interesiĝas pri fotado kaj turismo.
- Cezary KUBICKI, Ul. W. Wasilewskiej 14/1, 96-100 Skierniewice * 18-jara knabo deziras korespondi.
- Adamo ŁUKAWSKI, Skr. pocz. 95, 27-600 Sandomien * 24-jara ekonomisto interesiĝas pri Jugoslavio, ŝatas filmojn kaj librojn.
- Mika GENOWEFA, Ul. Trangutta 11/14, 57-200 Zabkowice Slaskie * 30-jara flegistino deziras korespondi pri ĉiuj temoj.
- Jan KOYŁOWSKI, Ul. Malinowskiego 14/4, 59-600 Lwówek Sl. * 23-jara viro deziras korespondi.
- Urszula MICHALSKA, Wardezyn 19, 62-570 Rychwal * 29-jara instruistino serĉas korespondantinon.
- Danuta SZYMELFEJNIK, Ul. Żeromskiego 70/748m3, 09-300 Żuromin * 28-jara flegistino interesiĝas pri turismo, historio kaj literaturo.
- Adam KOWALSKI, Ul. H. Sawickiej 5/6, 67-400 Wschowa * 21-jara fraŭlo interesiĝas pri turismo, geografio kaj fremdaj lingvoj.
- Joanna WIECZORKOWSKA, Ul Zwigzku Patriotow Polskiew 1/36, 85-858 Bydgoszcz * 19-jara lernantino volas ekkoni amikojn el Jugoslavio.

# EBRIA MARISTO

Muziko kaj teksto de
Neven MRZLEĈKI

moderato — FINE

V.
G.

1. SEN - KVIE - TAS LA A - NI - MO
MAL - GRAŬ L'E - FEK - TO DE L' VIN':
MAL - PRO - KSI - MO ĈI - AM LO - GA - DIS MIN.
MIN.

D.C. al FINE

2. Pri hejm' kaj am' pasia
ne pensas mi pro amar':
nostalgia
solas sopir' trans ondar'.

3. La forta liberĉeno
ligas min al horizont':
orfadeno
inter la kor' kaj ĝufont'.

4. Vagadi trans la maroj,
ĉiam pli foras la ĝoj'
vent' en haroj,
kvazaŭ lastus la foj'.

V. – voĉo
G. – gitaro

# Tibor Sekelj

## MI VIZITAS MIAN FARMON

Mi ne estas globtrotero, kiu manĝegas distancojn por funfaroni pri ili.
Nek vojaĝisto senhejma, vaganta tra fremdaj landoj, pri la sia sopiranta.
Nek turisto senzorga kun vojiro antaŭvidita en gvidlibroj,
nek pilgrimanto, kiu surgenue venas al sanktejo por plenumi promeson.

Bienulo mi estas trairanta sian bienon inter la sep maroj dissemitan.
Kaj kiel bona mastro, mi ŝatas la plej kaŝitajn terpecojn de mia farmo,
samkiel la riĉegajn urbojn plenajn je vibranta lum'.

Ĉiuj vojoj de la mondo al mi apartenas.
Ne gravas ĉu temas pri nuboj, per kies flugiloj mi rajdadas,
aŭ pri maraj ondoj, kiuj disiĝas antaŭ la pruo de mia goeleto,
aŭ pri reloj perdiĝantaj je l' horizont' senfina,
aŭ pri praarbaro, kiu malfermiĝas antaŭ la klingo de mia tranĉilego.

Ĉiuj vojoj ekestis kun la kaŝita espero,
ke iun tagon miaj plandoj en ili siajn spurojn postlasos.
Kaj vere mi trairos ilin, frue aŭ malfrue,
dum tiu ĉi inspekcia vojaĝo tra la mondo.

Mi devas vidi ĉu mia bieno ankoraŭ funkcias kiel ĝi devas:
ĉu ĝustatempe estas semata la semo, kaj ĉu la rikolto farata ĝustatempe.
Kaj mi devas riproĉi la pluvon malfruan,
kaj laŭdi per ŝultrofrapetoj la aperon de matena sunradi'.
Estas devo mia mezuri per paŝoj la montojn plej altajn de l'Universo,
por scii ĉu la inĝenieroj ne trompis min je kelkaj metroj.
Kontrolendas nepre, ĉu en la iglo eskima vere ne stas malvarme,
kaj ĉu estas vero, ke en Hindujo nur blankturbanaj hindoj promenadas.
Kiel mi povus scii, ĉu estas pli bona la kafo en Gvatemalo aŭ en Etiopio,
antaŭ ol gustumi la nigran nektaron en ambaŭ lokoj!
Kiel mi povus distingi la ĉirkaŭbrakon de gejŝo kaj de mulatino,
se mi ne pasigus almenaŭ kelkajn noktojn en Japanujo kaj Kubo?
Mi surgrimpos vulkanon, por esti certa, ke ĝi fajron vomas,
kaj belenon mi ĉasos, por admiri la akvokolon eligatan de ĝi:
tiel mi jam ne intermiksos ambaŭ kreaĵojn de mia bieno.
Kaj kiam la amazoniaj ĝangaloj estos al mi prezentataj kvazaŭ afrikaj,
mi scius diskuti ĝisfine la aferon, kun plena kono de detaloj.

Kaj se dum promeno tra l' ekvatoro aperas antaŭ mi la noktomeza suno,
oreltire mi ĝin punos kaj sendos al poluso, sciante, ke tie estas ĝia loko.
Ankaŭ mi devas kontroli, ĉu la neĝeroj faladas de supre malsupren,
kiel oni informis min,
ĉu la pedikoj sin alkroĉas vere al la haŭto,
ĉu la papilioj ne estas pentritaj de ludemaj pentristoj,
kaj ĉu la panarbo kutimas naski biskvitojn dum sekaj sezonoj.
Al Lhasa mi intencas iri, por ekkoni la Dalai-Lamaon,
kaj al Usono, por premi la manon al Joe Louis.
Tiel mi povos riproĉi ilin, se iun tagon renkontos
la tibetan sunktulon ludantan biliardon en iu kafejaĉo de Buenos Aires,
aŭ la boksiston preĝantan en Meka, antaŭ la Kaba ŝtono.

Ĉar perfektan ordon en mia farmo mi postulas:
la suno dumtage laboru, kaj la steloj briletu dumnokte.
La riveroj al al maro fluadu, kaj la montoj restu surloke.

Kvankam mi klopodas ne esti rimarkita, pro pli efika kontrolo,
ĉie oni min konas.
Dum vagado tra arbaroj, la birdoj gajege min salutas.
Serpentoj kaj testudoj respektoplene kuras al siaj kavernoj:
"Infanoj, infanoj, hodiaŭ estas ja festo... jen pasas la granda sinjor'!"

Je vesperkrepusko, kiam mi iĝas meditema,
per purpur' amema sin vestas la ĉiel',
por karesi miajn lacajn palpebrojn
Kaj kiam malsekigas min petola somera pluvo,
kiel pruvo de pento la ĉielarkon ĝi sendas, timante riproĉon mian.
La formikoj suriras miajn krurojn, kaj la dornoj penetras la haŭton,
por preni sian parton de la sango de l' Homo, sia granda sinjor'.

Kaj mi... ĉiujn ĉi riverencojn akceptas kun kompleza rideto,
per svingeto malpeza kaj bonvolema respondante,
kiel decas al bienulo vizitanta sian farmon
dividitan laŭ ses kontinentoj,
de sep maroj ĉirkaŭitan.







LA JUBILEA JUGOSLAVIA POSTMARKO

En 1953, okaze de la Universala Kongreso en Zagreb, estis eldonitaj du poŝtmarkoj en valoroj de 15 dinaroj kaj 300 dinaroj. Tiu ĉi lasta estis eldonita en malgranda kvanto, kaj tiel okazis, ke ĝi atingis tre altan filatelian valoron. Efektive ĝi nun estas la plej valora jugoslavia poŝtmarko iam eldonita.

Honore al la centjariĝo de Esperanto estas eldonita nova poŝtmarko kiu konservis la formon kaj la desegnaĵon de la malnova. La eldonkvanto estas nur 180.000 ekzempleroj, do ni povas esperi ke ankaŭ ĝia filatelia valoro konstante kreskos.

De aprilo 1988 tra Zagrebo cirkulas du tramoj kiuj surhavas E-reklamon

